**La babiladaj rondoj** okazas vendrede je la 19a horo.
La gastiganto mem preparas simplan manĝaĵon (ĉefmanĝon kaj deserton). La invititoj alportas __nur__ trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. Je la fino ĉiuj donacas monon al la gastiganto por kontribui al ties elspezoj. Okaze de kunveno ĉe Espace Dickens ĉiu kontribuas ankaŭ al la lupago de la salono. (Fr 80.-).

__Aliĝu al unu aŭ la alia grupo perrete.__

Ni devos rediskuti pri la maniero organizi la babiladajn rondojn kiam preskaŭ neniu partoprenas. Pripensu...

**"__Ambaŭ grupoj__"** ĉe Espace Dickens

**vendrede, la 17-an de novembro,** organizata de Cléa Robin

**"__Okcidenta grupo__" :**

**Ve, la 1-an de decembro**
ĉe François Randin
ch. de la Vallombreuse 14, Lausanne
076 369 29 17

__Aliĝu ĉe:__
http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd

**"__Orienta grupo__" :**

**Ve, la 8-an de decembro**
ĉe Toos Godat
ch. de Magnenèche, 1867 Ollon
024 499 21 16

__Aliĝu ĉe:__
http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6


## Laŭzana Esperanto – Societo

ĉe F. Randin – ch. de Vallombreuse 14 * CH – 1004 LAUSANNE
+41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
www.facebook.com/societedesperanto.lausanne
Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8
Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 –
Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


# Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo


decembro 2017 – n° 10

Sabate, la 16-an de decembro 2017
je la 11-a, ĉe Auberge communale d'Epalinges

## __Zamenhofa Festo__



- Vidu la lastan
- informilon
- kaj aliĝu



KRISTNASKO  NOVJARO



*Ĝojajn festtagojn al ĉiuj !*
*Feliĉo, bela fortuno kaj sano.*
***Festu bone !***



Lunde, la 8-an de januaro 2018, je la 20-a
**François prelegos pri sia enĉinia vojaĝo**
irinte serĉi la premion ricevitan pri nia filmo
« Tetaso amas vojaĝi »

Lunde, la 5-an de februaro :

## __Ĝenerala asembleo__

# Pripenso

*Okaze de Kristnasko, okaze de la renaskiĝo de la naturo – pere la kreskado de la tagoj -, mi proponas tiun pripenson de Albert Einstein :*

Lasu min klarigi, kiel mi komprenas la religion.

Ĝi ne estas la hindua religio aŭ tiu kristana aŭ alia sed la religio, kiu transcendas ĉi tiun aŭ tiun religion, la religio, kiu transformas nian propran naturon, kiu ligas nin nemalligeble kun la vero, kiu estas en ni, kiu ĉiam purigas nin kaj lasas la animon tute maltrankvila

dum ĝi ne trovas sin mem.

Ĝi estas mistera nedifinebla forto, kiu trapenetras ĉion.



Mi sentas ĝin, eĉ se mi ne vidas ĝin, ĝi defias ĉiun elmontron, ĉar ĝi estas tiom malsama, ol tio, kion mi kaptas per la sensoj.

El : Paco por vivi, Gandhi – Einstein en dialogo imagita per Nuvola di Capua

ligi : lier ⇨ malligi : délier ⇨ nemalligi : "non-délier" ⇨ nemalligeble : qui ne peut être délié, inséparable,
⇨ kiu ligas nin nemalligeble : qui nous lie intrinsèquement

# Maljunula rakonto

*Ĉu vi jam sentiĝis kulpa rigardante samaĝulojn kaj pensante :*
*- Mi certe ne tiom maljunas !*
*Do, vi ŝategos tiun rakonton :*

Sidante en la atendejo pro mia unua rendevuo ĉe nova dentisto, mi rimarkis lian diplomon ĉe la muro.
Tie lia nomo estis skribita kaj subite mi rememoris pri granda brunulo (kun brunaj ŝuoj) samnoma. Li estis en mia licea klaso antaŭ kvardeko da jaroj, kaj mi pripensis, ĉu li povus esti tiu knabo, kiun mi tiam ŝategis.
Kiam mi eniris la flegsalonon, mi tuj forĵetis tiun penson. Tiu grizharulo, kalva, kun vizaĝo sulkoplena multe tro maljunis por esti mia sekreta amato.
Tamen…! Kiam li estis ekzameninta mian denton, mi informiĝis, ĉu li studis ĉe la gimnazio *Henriko la 4-a*.

- Jes ! respondis li.
- Kiam vi bakalaŭriĝis ? mi demandis.
- En 1972. Kial tiu demando ?
- Nu, vi estis en mia klaso ! mi ekkriis.

Tiam tiu aĉa stultulo informiĝis :
- Kion vi do instruis ?…

